

# Esperantista

REVUO POR ESPERANTO - MOVADO EN ĈSR

## Podpisová akce pro Organizaci spojených národů.

Mezinárodní esperantské ústředí (Internacia Esperanto-Ligo) v Londýně podniká druh plebiscitu pro esperanto. Esperantisté podpisují a předkládají k podpisu prohlášení, ve kterém podpisující prohlašuje, že:

1. *Otázka mezinárodního pomocného jazyka je tak vážná a praktická, že by se jí měla Organizace spojených národů ihned zabývat.*

2. *Protože esperanto je jediný z umělých jazyků, jehož používání je po celém světě rozšířeno a zorganizováno, má Organizace spojených národů jeho dalšímu používání napomáhati a to jmenovitě vyučováním ve školách, kde jsou pro to vhodní učitelé, používáním v mezinárodním obchodě, v turistice a v korespondenci.*

Tato podpisová akce podniká se všude, kde jsou esperantisté, to jest po celém světě.

Místní spolky i aktivní jednotlivci už dostali zásilku tiskopisů a prosíme o jejich brzké vrácení. K dnešnímu číslu je přiloženo po jednom exempláři. Také ten je třeba ještě podepsati a nám vrátiti. Podepsati může každý muž i žena, starší 18 let. — Podepsala už také řada významných osobností.


Tam, kde jsou podepsány veškeré listky, jež jsme poslali, račte si vyžádati další. Na Slovensku se podepisuje text slovenský, který Vám zašle Slovenská Esperantská Spoločnosť v Bratislavě, Štefánikova 6 c. Podepsaná prohlášení vračejte hromadně na naši pražskou adresu:

Svaz esperantistů v Praze 47.

## Josef Vitek: Gajaj rememoroj el Svedujo.

Preskaŭ dudek jarojn mi interrilatas kun Svedujo. Estas mia esperantista frato Gösta Henriksson, kun kiu mi en la jaro 1928 komencis simplan korespondadon. Tiam mi ankoraŭ eĉ ne songis, ke nia korespondado estos la fundamento de miaj postaj tiel profundaj interrilatoj kaj ke Svedujo estos mia dua hejmlando... Jam en 1929 unuan fojon mi vizitas Svedujon kaj praktike ekkonas tiun al mi tiel karan landon. Ankaŭ Gösta kaj multaj, multaj aliaj vizitas reciproke mian patrujon dum la sekvantaj jaroj. Tiam ni jam sciis, ke estas necese labori por profundigi la entutajn konojn de la esperantistoj pri niaj ambaŭ patrolandoj. En 1936 duan fojon mi uzas la libertempon kaj pasigas ĝin en Svedujo. Hejme en diversaj gazetoj mi dissemas la konojn pri Svedujo kaj sveda esperantistaro, same faras la Svedoj. Henriksson fine en 1938 eldonas konatan taglibron »Per motorciklo en tri landoj«.

Venis la milito, dum kiu la interrilatoj estis tre maloftaj. Tuj post tiuj ĉi krizaj jaroj ni daŭrigis nian laboron. En novembro pasintjare mi ricevis la proponon prelegi en Svedujo. Tiam jam esperanto havas sufiĉe gravan ŝaton en nia ŝtato kaj mi proponas, ke Sveda Esperanto-Federacio petskribu pri mia elsendo la ministerion de l' informoj. Tio okazis. Kaj post nelongaj tagoj mi estas vokita per la ministerio por pridiskuti ĉion necesan. Fine de januaro mi ricevas skriban jesigon de la ministerio. Forpermeso de l' ministerio de instruado, prizorgo de la pasporto, zorgoj pri la necesa prelegmaterialo, ĉio iras rapide. Mi vizitas fine la svedan ambasadorejon kaj tie-unua malfacilaĵo. Laŭ la tieaj informoj daŭras mini-



Mácha-Lago en Doksy, kie estos 21. VI. - 31. VII. 1946  
Someraĵ Esperanto-kursoj

### DUETO.

El la dua akto de la opero Najado (Rusalka) de Antonín Dvořák. Vortoj de Jaroslav Kvapil. Tradukis Dr Pumpr.

Situacio: Princo submetiĝas al la delogado de fremda princino kaj komencas forgesi pri sia amo al la akvoŝeino Najado.

Princino

(akompanate de Princo):

*Subita fajro en vi bolas  
post ne tro longa interval',  
ĉiam pli dolĉe vi parolas.  
Rakontu al mi pri kia!'  
Kaj kien fuĝis la persono,  
tiu sen lingvo kaj sen nomo?  
Ĝi povus vidi, kia ŝanĝ'  
okazas nune pri l' fianĉ'.*

Princo:

*Kien ŝi fuĝis? Sciu Di' ..  
Sed tiun ŝanĝon vi mem kulpis.  
La somernokta iluzi'  
per nova sorĉo min uzurpis.  
Pardonu min, mi petas nun,  
pro l' efemera am' hazarda!  
Kaj kie brilis pala Lun',  
nun flagru via fajro arda!*

Princino:

*Se mia fajro lezos vin,  
vi ĉiujn propasiojn sentos...  
Sed se mi reforgesos vin,  
ĉu vi pri l' pala Lun' kontentos?  
Ĉar tiu belulino via,  
la somnambule anemia,  
ne estas fajro, sed glaci'...  
Kia domaĝo pri l' pasi'!*

(konkure kun la Princo):

*Jen venas por mi nupto-ŝanĉ',  
mi klare ridas kaj konstatas...  
Ŝajne ne estas la fianĉ',  
ĉu eble min aŭ ŝin li svatas.*

Princo

(pasie):

*Ho, krii mokinoj cent  
la monda furiozo!  
Almenaŭ por moment'  
vi estas mia rozo.*

*Ho, estas medicin'  
por sopirego akra  
— mi fine konas ĝin —  
Jen erotik' mirakla!*

(Li subite ĉirkaŭbrakas la  
Princinon):

*Mi rompos ĉiun kroĉon  
de l' sorĉa am-inklin'  
por aŭdi vian voĉon,  
por povi ami vin.*

## Lingvo.

*Překlad úkolu 1.*

El la radio-parolado de prezidento<sup>1)</sup> Dro Ed. Beneš la 24an de decembro 1945:

Ni ĵus solvas niajn grandajn problemojn politikajn. La forigo<sup>2)</sup> de la germanoj el Ĉeĥoslovakio<sup>3)</sup> estas granda revolucia kaj por ni ĝoja<sup>4)</sup> kaj kontentiga okazaĵo.<sup>5)</sup> Ĉu ni povis atendi tiujn ĉi rezultojn en la tempo de nia suferado en la jaro 1938? En ĉi tiuj tagoj vi aŭdis en Nürnberg<sup>6)</sup> la planojn de Karolo H. Frank kaj de la tiel nomata protektoro Neurath pri detruo de nia nacio kaj de nia lando. Nun<sup>7)</sup> la aliancanoj garantias al ni la elmigrigon<sup>8)</sup> de la germanoj el nia lando dum la jaro 1946. Ĝi estas justaĵo de la historio, unu el la plej pravaj<sup>9)</sup> kaj altaj, kiun ni atingos post tiu ĉi milito.<sup>10)</sup> Ĝi estas unu el niaj grandaj na — almenaŭ internopolitike — la tuta estontan historion de nia nacio. Ni alte ŝatu<sup>11)</sup> tion, ĝoju pro<sup>12)</sup> tio kaj ni realiĝu<sup>13)</sup> tion digne kaj humane kaj korekte<sup>14)</sup> laŭ<sup>15)</sup> vidpunkto morala.

En la unuaj monatoj de la printempo<sup>16)</sup> ni okazigos<sup>17)</sup> novajn elektojn<sup>18)</sup> kaj starigos novan parlamenton<sup>19)</sup> konstituci-donan.<sup>20)</sup> Ni faru tion digne, juste kaj dece.<sup>21)</sup> Ĉiuj politikaj partioj konsciu,<sup>22)</sup> ke post la elektoj<sup>23)</sup> ili devos denove kunlabori kaj krei<sup>24)</sup> parlamenton, kiu devos konkorde kaj kune<sup>25)</sup> interkonsenti<sup>26)</sup> pri la konstitucio kaj krei laborpovan<sup>27)</sup> plimulton por plenaj ses jaroj postmilitaj. La antaŭbalota kampanjo<sup>27)</sup> neniel fariĝu malĝentila batalo interpartia.<sup>28)</sup> Mi ŝatus vidi, ke certaj problemoj<sup>29)</sup> restu ne tuŝitaj en la elekto-batalo;<sup>30)</sup> ekzemple la problemo de<sup>31)</sup> nia alianco<sup>32)</sup> kun Soveta Unio.<sup>33)</sup> Ĝi estas problemo de la tuta nacio.<sup>34)</sup> Problemo komuna por ni ĉiuj kaj ĝi absolute ne estas nek estos objekto de iu ajn malakordo.<sup>35)</sup> En aliaj aferoj mi dezirus akordon<sup>31)</sup> jam en la tempo antaŭbalota.<sup>37)</sup> Ekzemple interkonsenton<sup>38)</sup> pri la ĉe-

mume 14 tagojn ĝis venos la jesiga respondo el Stockholm, ĉar la ambasadorejo ne rajtas proprvole doni la enirpermeson, Mia loko en la flugmaŝino estas praktike perdita. Ni eluzas niajn radioeblecojn kaj vokas la stockholmajn samideanojn helpi ĉe la komisiono por la eksterlandanoj. Ŝajnas preskaŭ ne eble komenci laŭplane la prelegojn. Lunde la 18an de februaro mi vizitas la ministerion de l'informoj kaj kia ĝojo! Tien oni jam antaŭ mia alveno anoncas telefone el la ambasadorejo, ke mia vizo estas preta. Sed tamen la loko en la flugmaŝino estas perdita, ĉar ĝi forflugas saman tagon matene. Nur kvar tagojn daŭris ĝis mi ricevis la enirpermeson, dank'al nia radioservo kaj speciale dank'al stockholmaj gesamideanoj, kiuj tuj agis laŭ nia radiopeto. »Kiam oni havas la feliĉon siaflanke, ĉio estas ebla...« diras nia proverbo. Ankaŭ tiam la feliĉo personiĝinta en mia bofrato, oficiro de la flugstacio, agis. Juste dum mia vizito en l'ambasadorejo li tien telefonas, ke venontan tagon forflugas speciala ĉeĥoslovaka maŝino por venigi stockholmajn sportistojn kaj li aĉetis unu vorturbileton por mi. . .

Do feliĉe por mi dum preskaŭ printempa vetero la postan tagon la 19an de februaro precize je la 9.20 horo ni forlasas la flugejon en Ruzyň kaj en la alteco de proksimume 400 m tra Lidice, Terezín, Bohemsaksa Svisujo kaj Berlin ni rekte flugas al Kobenhavn. Tie nin akceptas je la 13a horo tre malbela neĝoplufa vetero. Ni restas nur duonhoron kaj senpere al Stockholm. Dumfluge ŝanĝiĝas la vetero kaj bela suno elsendas siajn amindajn radiajn salutojn. . . Tiuj lagoj, lagoj, arbarejoj, arbaroj, ruĝaj domoj kaj ĉio laŭlinie, laŭplane, jes, tio estas Svedujo el birda perspektivo. Neĝo kovras tiun landon, glacio kovras ĝiajn lagojn kaj tio estas novaĵo por mi, ĉar mi konas Svedujon nur dumsomere. Bedaŭrinde mallonge daŭras tiu belega trankvila aernaĝo kaj jam je la 16a horo akceptas nin stockholmaj flugstacio Broma kaj ni surteriĝas. Trankvile venas la homoj kaj vi tuj konstatas la diferencon. Vi troviĝas simple en Svedujo, en la lando, kie nervozeco, bruo, aŭtomobilaj sonoriloj ne estas en la vortaro de l'ĉiutaga vivo.

En la flugstacio atendas min jam en Esperantujo tre konata homo Bernhard Eriksson, ĉefo de la Sveda Esperanto-Eldonejo. Li venigas min en la urbon kaj mi troviĝas kiel en la fabelo. Plenplenaj vendejoj, aŭtomobiloj, tramoj, neonreklamiloj kaj ĉio entute donas al vi la bildon de l'ĉefurbo Stockholm, de unu el malmultaj eŭropaj ĉefurboj, kiuj netuŝite travivis la militon. Mi hazarde pripensas nian »Patrineton« Praha, kiun mi matene forlasis kaj komparas la vivon esperante, ke ankaŭ tie la vivo eniros siajn normalajn relojn.

Vespere akceptas min kaj donas al mi la gastamecon dum tri tagoj sinjorino Anna Alamo, multe konata inter la esperantistaro de l'landoj trafita per la milito. Ŝi estas, kiu forsendas ĉiujn donacpaketojn en diversajn landojn kaj vi ne nur miras, sed dankas al ŝi pro tiu kristana helpo al la bedaŭrinda homaro. Nemiam la dankoj elpezigas tiujn centojn da forsenditaj pakajoj. . .

Venanta tago estas efektive solena por mi. Kun la prezidanto de SEF, konata E. Malmgren, ni vizitas ĉeĥoslovakian legacion kaj estas akceptitaj per la ĉeĥoslovaka ministro en Stockholm Dro E. Táborský, estinta persona sekretario de nia prezidento en Londono dum la militjaroj. Li tre interesiĝas pri mia prelegmigrado kaj pri la aranĝo de la sveda esperanto-movado entute. Vespere okaziĝas mia unua prelego en stockholmaj esperanto-klubo. Pli ol 100 personoj ĉeestas, inter ili pioniro Paul Nylén, kiu de mi ĝoje akceptas la korsalutojn de la tuta ĉeĥoslovaka esperantistaro. Kia ĝojo por mi povi ekkoni tiun ĉi oran homon. Ankaŭ ĉiuj aliaj konataj homoj ĉeestas la prelegon kaj postan kaŭtrinkadon, Vigla Tiberiu Morariu preparolas la tagojn pasitajn dum la konferenco »Paco per lernejo« en Praha. Jes, kara Tiberiu, tiam ni estis ankoraŭ multe pli junaj!

Sekvanta tago estas dediĉita al la vizito de l'ĉefaj stockholmaj gazetoj por pretigi necesajn intervjuojn. Post la preskaŭ tuttaga laboro kun mia »prelegpatro« vicprezidanto de SEF Jan Strönnne ĉio estas preta por komenci la prelegveturon, dum kiu mi havos efektivan eblecon ekkoni Svedujon de l'plej suda urbo Ystad ĝis al Kiruna super la polara cirklo, kun sia ĉarma meznokta suno.

Jam la 22an de februaro akceptas min neforgesebla universitata urbo Uppsala, kie antaŭtagmeze mi ekkonas la prezidanton de la direkcio de Sveda Esperanto-Instituto Karl Söderberg. Du prelegoj por la lerneja

junularo kaj unu publika estas faritaj dum tiu tago. Granda urbo montras al mi siajn mirindaĵojn, tombon de l'botanikisto Linné, universitatan aŭlon, katedralon kaj tre interesajn malnovajn domojn de l'studentoj. *Väs-teras* akceptas min duan tagon. *Salex* aranĝas miajn du prelegojn en tiu urbo de Asea-fabrikejoj. En mian taglibron mi tiam enskribis: »... pli ol 350 junaj homoj ricevis novajn konojn pri la militaj travivaĵoj kaj postmilita rekonstruo de Ĉeĥoslovakujo...« — *Salex*, ni povas esti kontentaj ankaŭ kun la dissemita kono pri nia kara lingvo.

Tra *Örebro* en *Karlskoga*. Multe mi aŭdis pri tiu vigla esperantista urbo kun siaj Bofors-fabrikejoj (kiel niaj Skoda). Efektive la movado estas vigla, tre vigla, kaj oni havas la senton, ke oni vere troviĝas en Esperantujo. La klubo »Aglo« kun siaj geagloj kaj geaglidoj, ho, kiel belaj rememoroj restas! Laŭ la areo la urbo estas la plej granda el la tuta Svedujo. Bela pitoreska preĝejo el 1586, moderna urba domo, lernejo de l'Bofors-fabrikejoj kaj la junulara hejmo estas la celoj de miaj vizitoj... El la vizito ĉe Vi, miaj karaj, restas nur belegaj rememoroj kaj la donacitaj floroj antaŭ mia forveturo en episkopan urbon Karlstad ĉe Vänern-lago. En proksima Skughal mi vespere dissemas la konojn pri mia patrujo. Matene longa veturo en *Skövde*, sed kiel ĝi rapide forkuras en agrablaj, puregaj, bone hejmtitaj kupeoj de svedaj elektraj trajnoj. En *Skövde* estrarano de SEF Lenard Åberg kaptas min por 11 tagoj por prelegi en ĉiuj pli grandaj urboj de Skaraborga distrikto. Dum nia ĉiutaga, pli juste ĉiuvespera laboro pasas la proponitaj tagoj tro rapide kaj venas la disiro kun simpatia kamarado Lenard. La laboro vokas min en Uddevalla kun belegaj mardeklivoj kaj granda industrio. Tie jam la reĝo de tieaj esperantistoj instruisto Einar Dahl atendas min, Necesa vizito de l'polico kaj vespera prelego en la urba domo. Post la prelego ni aŭdas jubilean 50an esperant-radioprogramon el Praha, en la hejmo de inĝeniero Hermansson, cetere tre agrabla homo. Posta tago estas dediĉita al Trollhättan, kun ĝiaj belegaj akvofaloj, elektrofabrikejoj kaj bonkoraj esperantistoj de la laborista grupo. Same belaj rememoroj kiel de ĉie, ankaŭ de tiu urbo estas notitaj en mia taglibro.

*Göteborg*, dua plej granda urbo de Svedujo, plej granda sveda haveno kaj urbo de Smetana. Kiel granda, kiel bela Vi estas! La bildo de l'haveno dum la sunsubiro neniam forlasos mian memoron. Domo de l'restado de Smetana, kun sia ĉeĥ-sveda ŝildo, teatro de Smetana, jes, karaj lokoj por ĉiu ĉeĥo. La prelego en la alllernejo estis unu el la plej belaj. Multaj esperantistoj estas en tiu ĉi urbo. Venonttage akceptas min malgranda loko *Surte*. Tieaj esperantistoj prave estas fieraj, ĉar ili posedas propran esperanto-domon, kiu jam gastigis multajn svedajn kaj eksterlandajn esperantistojn. Vi povas legi konatajn nomojn Dro Szilagyí, Morariu kaj multajn aliajn en la gastlibro. Feliĉaj *Surteanoj*, vi donas la ekzemplon al ĉiuj aliaj lokoj de Esperantujo. *Alingsås* vokas min por havi kluban prelegon. En hejma trankvileco mi travivas la vesperon ĉe ĉefinstruisto *Embring* en la rondo de lokaj esperantistoj. — *Borås* havas laŭdire tre malagraban veteron kun multe da pluvo. Tamen belega printempa vetero bonveniĝas min la 17an de marto dum mia alveno. Redaktoro *Elg* dum du tagoj gastigas kaj akompanas min. La urbo havas belegan urbodomon kaj fontegon antaŭ la urba domo. Duan tagon mi spertas, ke oni diras la veron pri la vetero, ĉar malŝatata neĝopluvo regas en sia tuta forto. Sed jam antaŭ *Ulricehamn* denove la suĉo iom post iom traigas la nubojn. Lerta esperantisto *Stenström* aranĝis vesperan prelegon kaj postprelegan kaftrinkadon. Meztage mi forlasas la urbeton por daŭrigi en la urbo de l'biciklantoj *Halmstad*. Vere neniu sveda urbo havas tiom da biciklantoj kaj oni povas ĝin kompari nur kun la dana ĉefurbo *Kopenhavn*. En *Halmstad* vivas granda amiko de nia ŝtato profesoro *Erik Frisk*, al kiu nia popolo estas tre dankema, ke li multajn el la ĉeĥaj klasikuloj tradukis en la svedan lingvon. Antaŭ la prelego mi vizitas lin kaj forportas neforgeblajn impresojn. Estas necese ĝoje menciigi, ke li perfekte estras ĉeĥan lingvon, kiu ja estas por la Svedoj tiel malfacila. La prelego okazas en brila salonego de l'urba domo, kies sidlokoj estas plene okupitaj. Profesoro *Frisk* ĉeestas ne nur la prelegon, sed ankaŭ la postan kaftrinkadon kaj oni povas konstati kontentecon sur lia vizaĝo. Tre ĝoje li parolas pri esperanto kaj ni sentas, ke ni plenumis gravan taskon interesigante tiun ĉi ĉefon de la loka radioservo kaj cetere tre altstarantan personon en granda havenurbo *Halmstad*. Venonttage, vizitinte proksiman banlok-

faj trajtoj<sup>39)</sup> de nia estonta konstitucio kaj akordon inter la ĉefoj kaj slovakoj.

La problemoj de plena kaj korekta<sup>40)</sup> funkciado de la naciaj komitatoj kaj de iuj el niaj oficoj<sup>41)</sup> kaj ĝenerale<sup>42)</sup> de nia nova jura ordo ankaŭ devus esti solvita<sup>43)</sup> jam plene kaj definitive. Senĉese<sup>44)</sup> mi aŭdas, ke la juraj normoj kaj reguloj<sup>45)</sup> kaj niaj novaj jurordoj estas ne sufiĉe respektataj.<sup>46)</sup> Multaj oficoj kaj multaj individuoj<sup>47)</sup> ankoraŭ nun propravole transiras la limon de sia kompetenteco;<sup>48)</sup> siajn devojn fiksitaĵojn al ili de la registaro kaj de la novaj leĝoj ili ne plenumas aŭ ilin arbitre<sup>49)</sup> trouzas. Ili ne forgesu ke ili devos prirespondi tion<sup>50)</sup> tuj, kiam ĉiuj aferoj stabiligos. Signo de stabiligo kaj de leĝa<sup>51)</sup> reguligo de la nova situacio en la ŝtato estas la preciza obeado al la leĝoj<sup>52)</sup> kaj la respekto al la ekzistanta jura ordo, eldonita de la nova registaro.<sup>53)</sup>

Dum<sup>54)</sup> oftaj vizitoj de la provincaj naciaj komitatoj en la Kastelo mi aŭdas el ĉiuj regionoj de la respubliko la ĝojan konstaton, kiel energie<sup>55)</sup> oni laboras, kiel oni ĉie en la respubliko laboras<sup>56)</sup> sociale, kiel oni savas la infanojn el la postmilita mizero kaj malfacilaĵoj, kiel oni laboras pri aferoj de lernejo kaj kulturo.<sup>57)</sup> Eble ne ekzistas alia lando, kiu nin superus en tiu granda planado kaj entuziasmo de konstruado.

#### Poznámky:

1) prezidanto = předseda, prezidento = president, 2) foririgo, elmigrigo, fortransportado, 3) doporučené jeme tuto mezinárodní formu, 4) ĝojiga, 5) novotvar: evento; nikoli však okazintaĵo = kio jam okazis, 6) v textu určeném pro cizinu není možno dávat cizím městům česká jména, kdo by rozuměl, co je to Vídeň, Benátky a p.; jen u měst, jejichž jména často přicházejí v životě esperantském, možno použít zavedených tvarů esperantských, na př. Parizo, Londono Nurembergo atd., 7) lepší než: hodiaŭ, 8) rajtaj, rajtoplenaj, rajtigataj, 9) atingotan post... kiu realiĝos post..., 10) komplete modifos, aliformigos, aliigos, 11) ni alte taksu, 12) ne: ĝoju el io, 13) efektiviĝu, 14) neriproĉinde, sendifekte, senmakule, 15) el, 16) en la unuaj printempaj monatoj, 17) efektiviĝos, faros, aranĝos, plenumos, 18) novajn parlamentajn elektojn, balotadon por la parlamenton, 19) ni plenumos... konstituiĝon de nova parlamento, 20) konstituci-

iga; nikoli ale »leĝodona«, kaŝdy parlament »donas leĝojn«, ale tento má »doni konstitucion«, <sup>21)</sup> ĝentile, <sup>22)</sup> konsciu tion, ke . . . , konsciu pri tio, ke . . . <sup>23)</sup> post la balotado, <sup>24)</sup> formi, <sup>25)</sup> en konkordo kaj kuneco, <sup>26)</sup> interkompreniĝi pri, <sup>26)</sup> laborkaplan, laboran, <sup>27)</sup> antaŭbalota agitado, propagando, <sup>28)</sup> senskrupula batalo inter la partoj, <sup>29)</sup> demandoj, <sup>30)</sup> tute ne aperu en la elekto-batalo, estu eligitaj el . . . , estu eliminitaj el . . . , estu preterlasitaj, estu esceptitaj . . . , <sup>31)</sup> problemo pri, koncerne ion, <sup>32)</sup> nikoli: unuigo, <sup>33)</sup> Sovetunio; Plena vortaro ustálil tvar soveto, nikoli sovieto ani sovjeta, <sup>34)</sup> tutnacia, <sup>35)</sup> disputo, polemiko, <sup>36)</sup> interkonsenton, <sup>37)</sup> en la tempo antaŭ la elektoj, <sup>38)</sup> interkompreniĝon pri . . . , <sup>39)</sup> ĉefaj linioj, esencaj linioj, punktoj, <sup>40)</sup> bona, ĝusta, <sup>41)</sup> lepŝi neĝ: de kelkaj niaj oficoj, <sup>42)</sup> entute, <sup>43)</sup> nikoli: la problemo . . . estu solvota, Solvota t. j. ve stavu pŝed ŝeŝenim ten problŝm je, president si pravŝ pŝeje, aby byl jiĝ vyŝeŝen: solvita, Rovneĝ ne: solvenda, z tŝchĝ dŝvodŝ, <sup>44)</sup> konstante, ĉiam, daŝre, <sup>45)</sup> ordonoj, instrukcioj, <sup>46)</sup> ne estas sufiĉe atentataj, ke al la . . . normoj oni ne dediĉas sufiĉan respekton, ke pri la . . . normoj oni ne sufiĉe atentat, <sup>47)</sup> unuopuloj, <sup>48)</sup> trouzas, misuzas sian kompetencon, <sup>49)</sup> laŭvole, libervole, propravole, <sup>50)</sup> respondeci pri tio, <sup>51)</sup> laŭleĝa, <sup>52)</sup> plenumado de la leĝoj, <sup>53)</sup> respekta-do de la donita jura ordo starigita de la registaro, <sup>54)</sup> ĉe, <sup>55)</sup> persiste, <sup>56)</sup> kiel oni tra la tuta respubliko laboras . . . , <sup>57)</sup> aferoj lernejoj kaj kulturaj.

Doŝlo nŝs celkem 38 pŝekladŝ, kte- rŝyĝto pomŝrne velkŝ poĉet nŝs pŝijem- ne pŝekvapil. Uĉastnili se: A. Bŝrocho- vŝ, Jar. ĉiĝek, A. Konopovŝ, Hedva No- vŝkovŝ, Jindra Slavikovŝ, J. B. Vlach, vŝichni z Prahy; Jiŝi a Markŝta Oĉe- nŝŝkovi, Fr. Petr, Fr. Pytloun, Josef Sobišek, Boĝ. Weinerovŝ z Hradce Krŝ- lovŝ; Jiŝi Bartoŝ, Mladŝ Boleslav; B. T. Novotnŝ, Liberec; Al. Koŝtŝl, Trnovany u Teplie-Sanovŝ; Vŝera Bischofovŝ, Lad. Kuĉera, oba Roudnice; Dr Josef ĉernŝ, Litomŝriĉe; Ing. Jar. Rebiĉek, Havliĉ- kŝv Brod; Vojtŝch Matouŝ, ĉeskŝ Bu- dŝjovice; Lŝda Proskovec, Plzeň; Ing. K. Krajic, Tŝbor; Jan Zdvihal, Tŝnec n./S.; Viktor Kostka, Novŝ Bydĝov; Nepodepsanŝ, poŝt. razitko Turnov-Pra- ha; Esp. Klubo (Jan Geryk), Brno; Vl. Blaĝek, Jos. Bretschneider, Rud. Golla, Fr. Kuba. A. Pŝehnilovŝ, vŝichni z Olo- mouce; Alb. Kŝivŝ, Uh. Hradiŝtŝ; Marko Juriĉ, Hradeĉnŝ u Uniĉova; B. Toman, Proŝtŝjov; Ant. Sattek, Pŝibor; Jozef Mŝaĉko, V. Levŝre; Eugen Matirko, Koŝice; Jul. Prochŝzka, Rajhrad; R. Jandik, ĉernilov.

Tylŝsand, mi startas por veni post dekjara paŝzo denove en malnovkonan- tan Malmŝ, trian plej grandan urbon svedan. ĉe la stacidoma elirejo atendas jam Gŝsta kaj aliaj. Kiel ĝoja revido post dek jaroj, speciale post tiuj militaj jaroj. Vespero estas dediĉita ĉe bonkoraj Hansson. Kul- ladal, la antaŭurbo, kaj la familio Andrŝn estas mia hejmo por kelkaj tagoj. Tie mi sentas vere la hejmodoron, ĉar ili bone konas min kaj jam de multaj jaroj. Multa, multa estas la babilado pri ĉiuj kaj ĉio konata en ĉeĝoslovakujo. Nur morgaŭa vespero estas dediĉita al la prelego, kiun vizitas multaj gesamideanoj ankaŭ el aliaj urboj. Sabate la 23an de marto ni aranĝas tre sukcesan ĉeĝoslovak-svedan muzikvesperon. Dimanĉe mi vizitas distriktan jarkunvenon en universitata urbo Lund kaj vespere ni vizitas Malmŝan operon. La teatro estas la plej moderna kaj la plej granda, kiun mi ĝis nun vidis: 1700 sidlokoj, belegaj hadoj, ideala loko por la universala kongreso de esperanto. Malmŝanoj interesas pri l'aranĝo de l' kongreso kaj ni esperu, ke ili sukcesos. Plej malnova studrondo »Verda Oko« kun siaj familianoj travivas kun mi la lundan festotagon. Marda kaj lasta vespero en Malmŝ estas dediĉita al la familio de Nils Bergstrand, unu membro el la »skuanta« kompanio, pri kiu skribas Gŝsta Henriksŝon en sia libro. Bone mi fartis en Malmŝ ĉe geamikoj Ester kaj Helge, ĉe ĉiuj aliaj kaj estas nur bedaŭrinde, ke la belaj horoj tiel rapide pasas. Lund kun sia mondfama katedralo estas la urbo, kie mi prelegas post la forlaso de Malmŝ. La klubo konstistas plejparte el la fajrobrigadi- stoj. Malgranda loko estas *Klippan* kun sia paperindustrio, sed tre bonaj kaj afablaj estas la geesperantistoj. Se vi volas aŭ ne, vi sentas vin hejme en ilia rondo. Tre granda estas la diferenco, kiam vi venas en *Hŝl- singborg*, belega havenurbo. Tie vi sentas la venton de l'malproksimaj landoj. Sufiĉe multe povas rakonti tiu ĉi urbo pri la milito, ĉar tute proksime estas dana urbo Hŝlsingŝr, de kie multaj homoj fornaĝis kaj kelk- foje nudaj ili estis akceptitaj sur sveda flanko en tiu ĉi urbo, kie la ur- bestro estis la kapo de tiu helpa komitato. Plej malfeliĉaj estis la urbanoj, kiam la germanaj armeoj surbordigis kaj trairis la urbon por veturi nor- den. Nun el Hŝlsingborg estas forsendata ĉiu helpo de Svedujo al aliaj eŝropaj ŝtatoj kaj nur hazarde mi vidas ŝarĝaŭtomobilan trupon, kiu post kelkaj horoj estas ŝipe forportata en Hŝlsingr kaj de tie veturas Buda- peŝton plene ŝarĝita per diversaj necesaj varoj. En ĉiuj urboj de Svedujo vi vidas multajn eksterlandajn rifuĝintojn, kiuj ĉu vivas en specialaj ten- darioj ĉu jam libere laboras, atendante la fortransportadon en siajn hejm- landojn. Same vi vidas multajn infanojn el diversaj landoj, vi scias ke ĉiu Svedo sendas ĉiumonate pakajon al iu eksterlanden, vi scias, kiom helpis svedaj esperantistoj ankaŭ al la ĉeĝoslovakaj kaj ĉio tio estas la danko de l'sveda popolo, ke ĝi restis netuŝita per la milito. Jes, ili ne plenumas sian moralan devon al la malfeliĉa homaro, ili faras multe multe pli, ĉar bonagi estas firme kunligita kun la animo de ĉiu Svedo. Feliĉe, ke juste tiu ĉi, tiel alte kulture kaj anime staranta lando restis izolita de l'milito.

El Hŝlsingborg mi startas prelegi en la plej sudsveda urbo *Ystad*. Tie mi havas la eblecon iom konatiĝi kun la hejmslojdo, alivorte kun popola sveda arta produktado. Tre interesaj kaj tipaj estas la produktoj de l' di- ligentaj manoj de Svedoj kaj tamen, ke la maro nun dividas la regio- non de Germanujo neniu radikon en la arto vi trovas el la alia flanko de l'Balta maro transprenita. *Rynge*-vilaĝo apud *Ystad*. Tie vivas tre bon- kora esperantistino fraŭlino Jŝnsson kaj ni sukcesas aranĝi lernejan pre- legon. — Longaj mejloj pasas ĝis mi venas en la komunumon Strŝmsnŝs- bruk, kie mi havas du prelegojn. »Patro« Olsson min atendas. Tre agrabla estas lia esperanto-familio. Sinjorino, du filinoj-ĉiuj esperantistoj-feliĉa familio. Patro Olsson, mi devas tute sincere konfesi, ke mi ankoraŭ eĉ nun ne scipovas la skanian dialekton, kiun Vi tiel ŝatas kaj provis lerni min. Sed mi certigas Vin, ke venos la tempo! Pli ol 150 kilometroj divi- das min de la venonta prelegloko. *Nybro*, sed tio ne gravas por la patro, kies filo venigas min aŭtomobile ĝis en Vŝxjŝ. Dumvoje ni vizitas la naskiĝdomon de fama Linnŝ en Stenbrohult. El Vŝxjŝ estas nur unu- hora trajna veturo en Nybro, belega urbeto kun la lago, kiu preskaŭ ne- niam mankas ĉe iu sveda urbo. Tiu ĉi regiono estas fama per siaj vitro- fabrikoj, kiuj produktas ĉiun specon ĝis la plej arta. Speciale la vitro- fabrikoj en Orrefors estas modernaj kaj tre interesaj. Nun ili prizorgas la mendon de l'reĝo de l'reĝoj Haile Selasie el Abesinujo. *Kalmar*, tute proksima balta havenurbo estas efektive nepriskribebla bela. Kvar pre-

legoj en tiu urbo signifas dutagan restadon, dum kiu mi trarigardas la faman kastelon kaj tutan urbon. Tute proksima longa insulo Olando kaptas vian intereson tuj komence de la vizito de l'haveno. El la alta akvoturo vi vidas tiun belegan urbon denove el birda perspektivo. Tute tipa estas la fiŝkaptista parto de la urbo, kie mi loĝas kaj vizitas la fiŝkaptistojn. Stranga vivo ŝajnas al ni Mezeŭropanoj-nekonantaj la maron. *Vimmerby* havas en la proksimeco ĉefioslovakan rifuĝan tendaron kun proks. 50 virinoj. Liberan posttagmezon mi biciklas tien. Interese estas mencii, ke ĉiu nia civitanino estas dika kaj surprenis minimume 30 kilogramojn, plej multe 42 post la alveno. Ĉiuj sopiras veni hejmen kaj atendas la plej proksiman fortransportigon.

En la urbeto same kiel en *Ventlanda* mi prelegas publike eĉ por la lerneja junularo. Tra Näsjö, granda fervoja krucpunkto mi proksimiĝas al Jönköping - Huskvarna. Belegaj longaj urboj situantaj ĉe la granda lago Vättern. Granda industrio en Huskvarna produktas biciklojn, kudromaŝinojn kaj multajn mastrumilojn. Neforgesebla estas la panorama bildo de la urbo kun la lago. Bedaŭrinde nur unu tagon mi povas resti en tiu ĉi regiono, ĉar *Vingaker*, sufiĉe malproksima urbeto aranĝas ok prelegojn. Tri tagojn ni fidele kune kun la eksinsruisto Kilberg plenumas nian sanktan mision kaj nur malvolonte ni disiras. Sed estas granda bela urbo *Örebro*, kie la 14-an de aprilo vespere en *Vintergården* mi prelegas. La kastelo pro siaj turoj iom similas al tiu de Kalmar, sed mankas libera mara horizonto. - Lunde mi prelegas en *Kumla*, proksima urbeto, en kies najbareco posedas grandajn Ytongfabrikojn ora homo Erik Carlén, fondinto de la klubo en Örebro. Unuan fojon en mia vivo mi vidas segi la marmorstonon kaj prilabori ĝin ĝis al la plej granda lukseco. La fabrikoj produktas ankaŭ domkonstrumaterialon, kiun oni nomas »naĝanta ŝtono«. Vespere ni aŭdas la prelegon de Privat voĉe de samideano Hromada. Tre agrabla vespero por ni ĉiuj. Sekvantan tagon mi troviĝas en *Halsberg*, loko kun la plej ampleksa ŝarĝvagonara relejo en la tuta Svedujo. Ĝi estis konstruiĝa laŭ tiu de Nürnberg. Estas interese trarigardi por mi nekonatan aranĝon de tiu relejo kun magazenoj kaj ĉio, kio kaŝiĝas sub la vortoj ŝarĝvagonara trafiko. La 17-an de aprilo mi prelegas en Motala, urbo ĉe la lago Vättern kaj fama Göta-kanalo. La stango de la radiostacio estas videblaj jam de malproksime. Fine mi troviĝas en tiu urbo, kies nomo mi tiel ofte aŭdis pere de la radioondoj. Nur unu tagon mi restas kaj bone mi fartas inter la gesamideanoj, Matene mi forveturas pli ol 300 kilometrojn en Malmö denove por ĉeesti la paskan jubilean feston de l'klubo, kiu estis fondita antaŭ 40 jaroj.

## Egon Hostovský: En kio ni ne komprenas la Amerikanojn.

Egon Hostovský, ĉeĥa verkisto, kiu fuĝis antaŭ la nazistoj Amerikon, fariĝis tie dum la ses jaroj fama kaj glora verkisto, kiam aperadis liaj verkoj anglalingve. Post la milito li revenis patrujon. La tradukita artikolo aperis en »Svobodný zítřek« 18-an de aprilo 1946.

Se vi aŭdas iun el niaj samlandanoj kritikojn amerikajn klerulojn, vi ekscios preskaŭ ĉiam, ke la Amerikanoj trotaksas la valoron de sia lando, ke eĉ la plej saĝacaj inter ili ne komprenas la politikon, ke ili ne scias pri Eŭropo kaj tamen volas ĝin plibonigi, ke ili partoprenas en tiu ĉi milito ne elkore, kaj ke ili havas tendencon al amuzoj tiom senspritaĵaj kaj sovaĝaj, ke racio de mezklara Eŭropano pro tio haltas. Do tio ĉio kune estas kaj ne estas vero, aŭ pli bone: ĝi estas duonvero, kaj tia ofte estas pli malbona ol mensogo.

Amerikano, precipe amerika intelektulo, estas nek pli malbona nek pli bona patrioto, ol estas iu ajn lia kolego el Eŭropo.

Certe pli ol triono de ĉiuj Yadda-gastoj vojaĝis iam tra Eŭropo. Plej bone ili konas Francujon kaj poste Germanujon. Ili scias pri ni sufiĉe multe.

En Eŭropo ili vidas eternan fonton de talentoj, de nova arto kaj de novaj ideoj. Malsanojn de Eŭropo ili ne komprenas, por tio, kio okazis depost la jaro 1933, ne sufiĉis ilia fantazio. Kiom ili kontaktis kun fu-

ŭroveĥn mnohych překladů je překvapivě dobrá, naši spolupracovníci přijmeme dík a gratulaci! Za nejlepší bychom označili práci pí A. Přehnilové z Olomouce. Vedle ní označili bychom 4 další překlady jedničkou, 9 dvojikou. Všem účastníkům děkujeme a zdravíme je přátelsky.

K. H. Bouška, R. Hromada, St. Kamarýt.

### Úkol 2.

Je zcela jiný než prvý a ještě náročnější. Překlad t. zv. cizích slov do esperanta není vždy snadný ani nelze vždy použití téhož cizího kmenu. Předkládáme proto k překladu 8 takových slov, s významy různě odstíněnými, ve větách z klasických českých autorů. Prosimе o překlady cizinci snadno bezprostředně srozumitelné, plynulé a při tom co možno doslovné, t. j. odpovídající přesně smyslu a formě předložených vět. Poznáváme, že ani my nejsme prosti pochyb, jak některé ty větičky přeložiti. Překlady zašlete do 30. června!

1. ABSOLUCE, *rozhrěšení, odpuštění hříchů, odpuštění*. Až na smrtelném loži prosil hříšník tak zatvrzelý o absoluci.

2. ABSOLUTISMUS, *samovláda politická*. V době absolutismu Bachova byla čeština vypuzena téměř odevšad. Za onoho času absolutismus v rodinách vyrovnal se úplně absolutismu veřejnému.

3. ABSOLUTISTA, *samovládce*. Jest to doba velkých neb šťastných panovníků »osvícených absolutistů«. Stoupenec absolutismu politického, filosofického a pod. Kdo ve filosofii je takovým absolutistou jako Kirějevský, důsledně přichází i k národnímu absolutismu.

4. ABSOLUTNĚ, *naprosto*. Věci podivné, nebesky krásné, vedle absolutně nesrozumitelných. — *Nezávisle*. Neruda tvoří sám ze sebe, tvoří absolutně. *Neomezeně, samovládně*. Král ve Francii vládne absolutně.

5. ABSOLUTNÍ, *naprostý, nepodmíněný, prostý*. Vlastně není ani ve světě žádná ohyzdnost absolutní. Usnesení o návrzích na změnu ustanovení tohoto řádu volebního může se státi absolutní většinou zemského sněmu.

6. ABSOLUTNO, *nezávislé jsoucno, absolutnost, naprostá nezávislost*. Stručně můžeme se dohodnouti o mystických definicích filosofie, dle nichž prý předmětem naší vědy jsou: absolutno, neviditelno. Hlas srdce dal O. Březinovi kriterium a jistotu, zachoval pro něj absolutno jistých pocitů.

7. ABSOLUTNOST ve filosofii, *výhradní platnost, nezávislost, nepodmíněnost*. Filosofové 18. století věřili v absolutnost rozumu, všemohoucnost vědy. Na Rusi se libila rozháraněm absolutnost, kterou Hegel svým ideám připisoval.

8. ABSOLVOVATI, *vystudovati*. Přítel, vystudovav práva, stal se auskultantem. Absolvovaný filosof, akademik. — *Prověsti*: Orchestrální sdružení absolvovalo svůj pravidelný koncert této sezóny. — *Dáti rozhrěšení*: Řehoř VII. absolvoje prosícího císaře Jindřicha.



## Novaj libroj.

*Gaja leganto per Esperanto.* Verkis kaj kompilis P. E. Schwerin. Eldonita de The Esperanto Publishing Co LTD. Rickmansworth, Anglujo. Paĝoj 56. Tre bele presita libreto por novaj esperantistoj finintaj la kursion. La libreto havas la taskon esti gaja helpilo al grupestroj kaj kursgvidantoj, amuza ekzercilo por legantoj izolaj. Tre bona kaj facila stilo. La spritaj iam estas ofte ridigaj, kio ĉe multaj spritaj por instrua celo estas escepto. Prezo 1 ŝil. 3 p. aŭ 5 inter, respondkuponoj ĉe IEL.

*Prof. Agostinho de Silva: La araneoj.* Esperantigis M. S. Porto. Portugalio 1944. Paĝoj 24. Bone legebla populara traktajo pri araneoj. Bona lingvaĵo. Ĉe Libro-Servo 6.60 Kĉs.

*Prof. Agostino Silva: La vivo de eskimoj.* Elportugaligis M. F. Dua reviziita eldono. Portugala Eldona Rondo, Porto. Portugalio. Paĝoj 32. Interesa rakontado, kiu diras pli ol oni atendus en maldika kajero. Ĉe la Libro-Servo po Kĉs 6.60.

*Tipoj kaj aspektoj de Brazilo.* Originaloj el la »Brazilo Revuo de Geografio«. Tradukitaj de membroj de »Brazilo Ligo Esperantista«. Speciala presado memoriga okaze de la Deko Brazilo Kongreso de Esperanto okazinta en Rio de Janeiro de la 14a ĝis 22a de aprilo 1945. Paĝoj 145 grandformataj. Kun multaj ilustraĵoj. Tre impona kaj instrua libro. Jen titoloj de kelkaj ĉapitroj: Peco de rivero ĉe Amazono. Kauĉukokulturistoj. Kaŝtanoarbejoj. »Agreste«, zono el ŝtoneca grundo kaj maldensa vegetaĵo. Arbaro ĉe la orienta deklivo. Salejoj. Kaj multaj aliaj. La lingvaĵo de tradukoj bona. La libro per si mem dokumentas seriozecon de la Brazilo kongreso.

*Que é o Esperanto,* Rio de Janeiro. Servico Gráfico do I. B. G. E. Tre impona informa kaj propaganda portugallingva libreto por Esperanto: 64 paĝoj tre bele aranĝitaj tipografie kun tre trafa enhavo. En fino estas esperantlingvaj tradukoj el brazilaj poetoj.

*A. Brigolê: Santos-Dumont, la aerpioniro.* Aprilo 1945. Esperantigis Maria do Amaral Malheiro. Eldonita de Ministerio por eskterlandaj aferoj. Rio, de Janeiro. Paĝoj 32. Broŝuro priskribanta kiel dum la dek unuaj jaroj de nia jarcento Archdeacon, Santos Dumont, Blériot kaj kvindek de idealistoj fine sukcesis doni flugilojn al homo.

ĝintoj, ili aŭdis ekskluzive pri bestialaĵoj, perfidoj kaj malsato. Ĉe dertigita Eŭropo aspektas por ili Ameriko kiel paradizo. Ili ne komprenas, kial homo, kiu fuĝis el Eŭropo, diras, ke li volas reveni, kvankam li trovis tie ĉi okupon, amikojn kaj novan hejmon. Ili tion rigardas kiel iom da maldankemo. Riproĉi al ili, ke ili ne scias, pri kio en Eŭropo temas, povas sole blindulo, al kiu ŝajnas, ke tiu ĉi problemo estas klara ĉie ekster Ameriko. La amerika klerulo parolas ne sole kun propagandistoj el la plej diversaj informejoj, kun tiuj ĉi eĉ plej malmulte; unufoje klarigas al li sian starpunkton pola laboristo el Rusujo, duan fojon pola registara ĵurnalisto, trian fojon ĉeĥoslovako lin instruas pri meza Eŭropo, kvaran fojon riĉa madjaro - kaj la Amerikano simple rezignas. Ne tial, ke li ne kapablas klarigi al si la plej kontraŭajn opiniojn de homoj, kun kiuj li parolas, laŭ iliaj societa pozicio, eduko kaj personaj ambicioj, sed pro maldaŭreco de tiuj vidmanieroj kaj ilia ŝanĝemeco. Se ni jam estas severaj al Amerikanoj, estu ni severaj ankaŭ al Eŭropanoj kaj ni konsentu, ke ekzemple, Amerikano, kiu lojale informadis sin pri evoluo de rilatoj ĉeĥoslovakaj-polaj kaj pri ĉiuj deklaroj ĉirkaŭ tiu ĉi rilato, estas finfine iom konfuzita kaj poste surprizita, kiam la aŭtoroj de lia konfuzo helpas al li per riproĉo: »Nu jes, vi Amerikanoj ne komprenas Eŭropon!«

Jes, ili ne komprenas nin, aŭ nur malofte kaj malmulte, sed ĉu povas opinii senpartia observanto de eŭropaj kuirejoj politikaj, ke ni mem nin komprenas? Kaj ĉu ĝi ne estas precipe nia manko, kiam fremda klerulo, alirebla, modera kaj sen antaŭjuĝoj, ne povas kompreni?

Rilato de Amerika klerulo al la milito estis efektive duonvarma. Kiel en ĉiu lando de milito preskaŭ ne tuŝita. Sed ankaŭ en tiu ĉi fako oni devas iom malfidi al eŭropaj kritikantoj. Mi jam diris, ke la amerika klerulo estas homo efektive sagaca kaj tre rapide li malkovras oftan trompon de fremdaj »fervoruloj«. Kaj li ne aprobas, ke homo vivanta same komforte kiel li havu por si kaj por Amerikano mezurilojn diversajn nomigante sian senagadon, remburitan per oratorado kaj frazaĉoj, luktado, kaj Amerikan vivformon laborevitimo.

Estas kompreneble, ke Eŭropanoj venitaj dum la milito en Amerikon havis en la animo multon da malamo, kian ĉi-tiea homo neniam estis sentinta. Tiu malamo ofte ekspodadis en vakuo, ĝi serĉadis malamikon en ĉiuj anguloj, ĉar la efektiva malamiko estis malproksime. Ankaŭ tio malhelpadis reciproke interkompreniĝon.

En Yadda mi efektive ne komprenadis manieron de Amerikano amuzado. Mi ne komprenadis, kiel povas kleraj homoj dum la plej diversaj okazoj prezenti sin kiel infanoj. Saltegi, jubili, danci kaj ridi pri aferoj, kiuj tute ne estas ridigaj. Kaj ili reciproke ne komprenadis mian flegmon. Hodiaŭ mi pensas, ke kulpo enestas en mi: Amerikano scias ĝoji, eĉ la altranga amerika klerulo, ni jam tion ne scias. Amerikano scias esti infano, laŭte ekkriadi kaj ĉiamaniere manifesti sian amon al la vivo. Nenio estas al ni tiom malproksima. Sed ĉu ni turnas nin malŝate for de tiu ĉi ero de ilia vivo nur tial, ĉar ni envias al ili? Ĉu ne estas saĝe kaj bele abundegi per ĝojeco?

Ami la infanan vivon ĉion spitante?

El la ĉeĥa tradukis Stan. Kamarýt.

## Ni legis.

*Pacmovado kaj nuntempo (P. Th. Justesen.)* La defendnihilistoj en la malgrandaj ŝtatoj ĉiam asertis - kaj eble ankoraŭ asertos - ke tiuj ne povas defendi sin kontraŭ grandpotenco, kaj ke ĉiuj defendpreparoj dum tiaj kondiĉoj estas senutilaj aŭ eĉ malutilaj. Sed kion montris la milito? Tute malgrandaj kaj eĉ tute senarmilaj ŝtatoj havis konsternan kapablon por defendi sin. Ili ja ne po-

vis malhelpi, ke la malamiko inundas ilian landon, eĉ ne tiuj, kiuj prenis sin por fari provon; sed ili povis en alta grado paralizi la agadon de la malamiko en la lando, kaj kiam ili ricevis helpon de ekstere, ili en tre konsiderinda amplekso povis kunhelpi por repeli lin hejmen. Ne per sia kulturo ili tion faris. La frazon pri kulturo kiel defendo ni estonte preferos ne aŭdi. La milito tute kontentige montris, ke neniu kulturo povis fortimigi la germanojn,

kaj ke armiloj ĉiuokaze por kelka tempo povas forbalai ĝin, fermi universitatojn kaj ekzili la inteligentulojn. Malgranda nacio ne povas fidi al kulturo kiel defendilo, ankaŭ ne al armiloj — sed al la defendovolo! En vico da jaroj oni en la pli multaj landoj provis sisteme subfosi la defendovolon kaj ŝajne kun granda sukceso. Sed la rezulto estis nur ŝajno. Kiam malamiko inundis la landon, la defendovolo ekflamis kaj iom post iom fariĝis fajrego, kiun neniu armilo povis estingi. Ni ne fermu la okulojn antaŭ tio, kaj ni ne forgesu tion. La defendovolo estas instinkto, kiun neniu povas subpremi, kaj ĝi montris siajn forton kaj valoron. Tiu, kaj sole tiu, estas defendilo kaj ŝildo de popolo. Svisujo kaj Svedujo sukcesis resti ekster la milito. Ĉu pro granda forto? Certe ne. Timiĝis ankaŭ ne iliaj defendopreparoj, kvankam ili certe estis konsiderindaj kaj certe ankaŭ iom efikis. Ne! Antaŭ ĉio impresis ilia nedubebla kaj forte manifestita defendovolo. Oni preferis ne tuŝi ilin. Ili estis kiel abeloj, tre pacaj kaj amindaj bestoj — sed estas prudente resti en certa distanco de ili. (*Malgranda revuo*, Svedujo, 1945, Nro 1.)

*Kia estos la estonteco? (E. Hult).* Koncerne la estontecon de Esperanto ankaŭ ĝi estas malfacile antaŭdirebla. Ankaŭ ĝi dependas de nia emo dividi laboron kaj komforton. Ĝis nun nur malgranda nombro da aktivaj esperantistoj dediĉas sian liberan tempon por antaŭenigi kaj disvastigi la lingvon. Kiel atingi rapidan venkon de Esperanto, se ne ĉiu el ni alportas sian brikon? Ni ne nur postulu, ke la kunvenoj de la esperantogrupoj estu interesaj kaj sukcesaj, sed ni mem faru ĉion por ebligi la estiĝon de tiaj kunvenoj. Ne eblas aliu antaŭdiri, kiam aŭ kiel Esperanto venkos, sed pri io mi estas certa, nome ke la sukceso de la lingvo estas dependa de niaj propraj aktiveco kaj fideleco. Ni ne postulu interesajn kaj kontentigajn kunvenprogramojn ĉiam, se ni ne mem iufoje helpas la malmultajn laborĉevalojn de la grupoj. (*Malgranda revuo*, 1945, Nro 1.)

*Nederlando dum la milito (W. Veldman).* La verkinto de tiu ĉi artikolo loĝas en la urbo Leeuwarden en la plej norda parto de Nederlando. La artikolo estas — sen iuj ajn ŝanĝoj — ĉerpita el letero de sinjoro Veldman al la redaktoro de M. R.:

La 10an de majo 1940 ni vekigis

je la 4a matene pro muĝado de multaj flugmaŝinoj, kiuj transflugis nian urbon. Subite aŭdiĝis la maŝinpaŝiloj, kiuj staris sur la tegmentoj de kelkaj fabrikoj. Ni staris en la fenestro de nia dormĉambro. Fenestroj malfermiĝis. Homoj venis en la straton. »La germanoj atakas nin,« ili diris. Post la surprizatako al Danujo kaj Norvegujo ni mense jam preparis nin, tamen la subita realo estis konsterna.

Neniu laboris en tiu tago. Daŭre ni aŭskultis la radion, sed ĉiuj sciigoj estis pri falsirmilaj soldatoj tie kaj tie, pri multaj flugmaŝinoj, kiuj provis alteriĝi sur la bordo de Norda maro.

La sekvantan tagon la nederlandaj soldatoj retiriĝis, kaj kelkaj trupoj venis tra Leeuwarden. Ili iris al la fama digo, kiu ligas Frislandon al Nordholando. Unu tagon poste venis la germanoj. Ili estis ĝajaj, kvazaŭ ili farus plezurvojaĝon.

Mi ne povas priskribi, kion mi sentis. Mi nur bone scias, ke mi sentis strangan kontenton sciante, ke almenaŭ la unuaj centoj post eble du, tri horoj estos kadavroj. Ili estis tiom multnombraj, ke ili iris okcidenten sur ĉiuj vojoj, eĉ sur la mallargaj vojoj, kiuj ligas nur vilaĝeton al vilaĝeto. Ĉiuj iris en la direkto al la digo.

Ĉe la komenco de la digo estis kelkaj kazematoj. La ĝajaj, plezurvojaĝantaj germanoj ne plu pensis pri batalo. Ja preskaŭ du tagojn ili ekskursis sen kontraŭstaro. Plenplenaj estis la vojoj en la proksimo de la digo, kiam ektondris la kanonoj. Pli granda kaoso ne estas imagebla. Motorcikloj veturis de la vojoj en la apudvojaĵajn fosajojn. Kriado. Veado. Sirmejoj ne estis sur la ebenaj kampoj. La germanoj tamen alvenigis kanonojn, kaj nur kelkaj nederlandaj soldatoj savis sin rifuĝante sur la digo.

Tiam la germanoj ekiris sur la digo, sed post duonhoron ili estis en haĵlodensa paŝado. La motorcikloj kun apudaj veturiloj iris de la alta digo en la maron. Du semajnojn poste mi vidis centojn da motorcikloj, rustaj kaj plenaj de mara herbo.

Ankaŭ en aliaj lokoj de nia lando okazis sanga batalo, sed la germanoj estis tro multaj. Ili per bomboj detruis grandan parton de Roterdamo kaj minacis per bomboj detruigi ĉiujn gravajn urbojn, se ni daŭre defendos nin.

Venis la kapitulaco. Komence la

germanoj faris sian eblon, por ke la nederlandanoj amikiĝu kun ili. Ili sendis hejmen la militkaptitojn ne por fari el ni naciajn socialistojn. Ne, ne, ni mem decidu pri la strukturo de nia regado. Post kelkaj semajnoj tamen ekmoviĝis la enlandaj faŝistoj, kaj la germanoj agis plej stulte. Ili deklaris sin solidaraĵ kun ili, La sinteno de la nederlandanoj, jam ne amika, tuj fariĝis malamika.

La politikajn partiojn, kiuj ne likvidis sin mem, oni per unu ordono likvidis. El la nederlandaj faŝistoj ili elektis urbestrojn kaj komunumestrojn. Ĉiujn gravajn oficistojn ili anstataŭigis per perfiduloj.

Jam organizis sin liberbatalantoj. Subteraj flugfolioj aperis, okazis intenca fuŝado al germanaj objektoj. Tiam la germanoj komencis aresti personojn kiel garantiulojn. El kelkaj, kelkaj, fariĝis centoj, poste miloj. La hebreojn oni registris, ankaŭ iliajn posedaĵojn. Ili devis porti flavan stelon. Ĉe la enirejoj de parkoj, kafejoj ktp. estis afiŝaj tabuloj: »Malpermesite por judoj.« Kelkaj hotelistoj rifuzis akcepti la afiŝojn. Venis taĉmento da nederlandaj faŝistoj: Tuj decidu, jes aŭ ne! Se ne, oni tuj detruos la hotelan meblaron. Oni arestis la hebreojn, kaj ili iris al koncentrejoj en Nederlando aŭ tuj rekte al Germanujo. La mebloj el iliaj domoj iris al Germanujo aŭ estis dividataj inter nederlandaj perfiduloj. Venis ordono pri deviga laboro, komence nur por tiuj, kiuj laŭ la germanoj estis superfluaĵ en fabrikoj ktp. Poste la deviga laboro estis por ĉiu, kiu ne havis 50 jarojn. Nur speciala individua atesto liberiĝis de tia laboro. La germanaj soldatoj arestis ĉiun viron, kiu ne havis ateston. Baldaŭ atestoj estis akireblaj ĉe liberbatalantoj. La germanoj ŝanĝis la koloron kaj deklaris la unuajn atestojn ne plu validaj. Sed jam antaŭ la eldono de la novaj, la liberbatalantoj havis originalajn kaj plimultigis ĝin.

La liberbatalantoj mortpafis nederlandajn faŝistojn. Tiuj sinjoroj venĝis sin al homoj ofte senkulpaĵ. Preskaŭ ĉiun semajnon falis viktimoj. Centoj da liberbatalantoj serĉis kaŝejon ĉe terkulturistoj. Miloj da viroj kaŝis sin por ne esti devigitaj iri al deviga laboro en Germanujo. La germanoj organizis homĉasadojn, pafis rifuĝintojn, kiel oni pafas kuniklojn.

La rifuĝintoj bezonis kuponon por aĉeti manĝaĵojn. Preskaŭ ĉiuse-

majne distribukontoroj estis rabataj. non. Liberbatalantoj suferis en mal-  
 Iliaj familioj devis vivteni sin. Ban- liberejo. Ili estis mortafotaj. La ka-  
 ko subite estis vizitataj de maskitaj maradoj surprizatakis la malliberej-  
 viroj. Tiel la familioj ricevis subte- ojn kaj ofte sukcesis liberigi la ami-  
 N-ro 2.)

## Svaz esperantistů Československé republiky zve na

### Letní kursy esperanta v Doksech 21. - 31. července 1946.

- A. *Elementární kurs podle Cseh-metody.*
- B. *Kurs pro pokročilé* (gramatika, frazeologie, litera-  
 tura, theorie mezinárodního jazyka, organisace es-  
 perantského hnutí).
- C. *Kurs pro kandidáty učitelství esperanta.*

CSEH-METHODA je zajímavý způsob, jak naučíte  
 základům esperanta, dostačujícím k plynulé konverzacii,  
 za 10 dnů. Jejím autorem je

*P. Andreo Cseh,*

narozený 12. září 1895 v Ludošul-de-Mureš v Rumun-  
 sku, katolický kněz, který se věnuje šíření esperanta,  
 jako jedinému zaměstnání. Pro výcvik učitelů dle své  
 metody zřídil r. 1930 v Arnhemu v Holandsku samo-  
 statný mezinárodní ústav *Internacia Cseh-Instituto*,  
 který vydává o absolvování svých kursů diplomy. Uči-  
 telé našich kursů absolvovali řádné Csehovy kursy pro  
 učitele esperanta.

Znaky metody jsou:

1. Učitel, který od počátku používá jen esperanta.
2. Neužívá se učebnice.
3. Žáci odpovídají hromadně na učitelovy otázky.
4. Konverzacie se připíná na aktuální podněty, ne na  
 situace školské.
5. Hojně se užívá podnětů humoristických a žertu.
6. Žáci jsou vedeni k tomu, aby z naučeného mate-  
 riálu sami si odvozovali pravidla mluvnická.
7. Všem se musí žáci naučiti v kursu, domácí úkoly  
 jsou vyloučeny, aby se kursisté, kteří by byli za-  
 nedbali domácí přípravu, nebáli přijít do kursu.
8. Proto vedení kursu zaměstnává žáky celý den. Do-

poledne se vyučuje 4—5 hodin, odpoledne je re-  
 kreace často s esperantským programem a večer  
 zábavní podniky, rovněž sledující učební cíl.

9. Učitel musí se přesně držeti postupu, vypracova-  
 něho autory metody, jak po materiální tak po for-  
 mální stránce.
10. Učitel musí být příjemný zajímavý člověk, který  
 dovede též odpoledne a večery naplnit duchem  
 družného veselí a oddanosti cíli. K tomu dovede si  
 vybrat skupinu spolupracovníků, kteří vnášejí do  
 zábavních a vzdělávacích podniků každý něco z  
 kouzla své osobnosti.

Na kursech v Doksech budou vyučovatí pánové Karel  
 Šolc, Karel Vrba, Václav Špůr, Antonín Slanina.

Přednášetí budou pánové Adolf Malik, MUDr. Fr.  
 Vaněk, Jar. Mařík, Ph. Dr. Augustin Pitlík, lektor  
 esperanta na technice v Praze a j.

Pravděpodobně promluví na kursech také p. Hans  
 Jakob, ředitel Universala Esperanto-Asocio ze Ženevy.

*Vyučuje se denně od 8 do 12 hodin.*

Odpoledne: Exskurse, koupání, plavání, procházky,  
 sportovní podniky, besedování, tanec.

Večer: Přednášky, diskuse, konverzační beseda, film,  
 tanec.

*Vedoucí kursu* p. Karel Šolc vyučoval v letech 1934  
 —1938 v Belgii pro Vlámskou ligu esperantistů a získal  
 vedle zkušeností učitelských úctu a autoritu vedoucích  
 funkcionářů vlámské ligy.

Účastníci budou *bydlet v Grandhotelu* a v hotelu  
*Bellevue* v dvoulůžkových pokojích. Pense Kčs 1070.—  
 za 10 dní obsahuje úplatu za byt, stravu (tříkrát den-  
 ně) i kursové.

Přihlášky se přijímají do 30. června a zasílejte je  
 vedoucím kursů, jimž je

*Karel Šolc,*

státně zkoušený učitel esperanta  
 v Mladé Boleslavi I, 41.

## Enlanda kroniko.

*Nova ĝenerala sekretario de la Asocio.* S-ro E. Zava-  
 dil, akceptinta tiun ĉi funkcion en la unua komitata  
 kunveno la 20an de januaro, ne povis sin dediĉi al la  
 taskoj tiam akceptitaj kun necesa streĉo, ĉar baldaŭ  
 post la elekto ne atendite kreskis temporabaj devoj de  
 lia profesio. Tial li rezignis la funkcion. La komitata  
 kunveno la 16an de majo dankis lin pro la laboro ĝis  
 nun farita kaj elektis kiel ĝen. sekretarion novan komi-  
 tatanon senditan en la komitaton el la E. Klubo en  
 Praha s-on *Bohumil Paleček en Praha II, Podskalská*  
 48, tel. 433-38. Niaj membroj turnu sin nun en ĉiuj or-  
 ganizaj aferoj senpere al lia adreso!

*Lektorato pri Esperanto en Teknika altlernejo en*  
*Praha* estis la 28-an de majo 1946 laŭ decido de deka-  
 no de la Fakultato por specialaj sciencoj renovigita.

La lektoró *Ph. Dr. Augustin Pitlik* prelegos en vintra  
 semestro 1946/47 du horojn semajne. La decido sig-  
 nifas reakiron de tre grava pozicio oficiala.

*Esperantista societo en Olomouc* solene restarigos  
 dum Pentekosto (samtempe kun skolta kongreso en  
 Olomouc) en urba parko Esperanto-memorŝtonon, kiu  
 devis esti laŭ ordono de nazistoj forigita. Vespere oka-  
 zoz amuz - kaj leter-vespero. Al ĉi tiu festotago oni  
 invitas la samideanojn de la tuta respubliko. La ligan-  
 tajn mendojn por tranoktado akceptas Esperantista so-  
 cieto en Olomouc. Al la aliĝontoj oni sciigos precizan  
 programon ĝustatempe. Samideanojn, kiuj ne povas  
 partopreni, ni petas alsendi salutkartojn aŭ salutleter-  
 ojn por nia letervespero.

*Akademia Esperanto-Klubo*, kiu estis fondita la 20-an



de januaro de 1946 okaze de unua postmilita kongreso de esperantistoj en Praha, komencis post preparaj laboroj kunveni en kafejo Union ĉiulunde je la 20-a horo. Unua kunsido okazis la 1-an de aprilo kaj ĉeestis 11 anoj, inter ili s-anoj Heřman, Mařík, Raim, Slavík kaj Hanuš. Oni diskutis pri la laborprogramo de la Klubo kaj oni decidis aranĝi regule prelegojn aŭ referatojn kun sekvaj diskutoj pri temoj precipe sciencaj kaj filozofiaj. Tiuj prelegoj okazos en ĉeĥa lingvo, sed krom tio la anoj ankaŭ pliperfektigos sian konon de Esperanto kaj ekrilatos pere de nia Asocio kun eksterlandaj studentoj. La 29-an de aprilo parolis s-o Hošek pri Sperto kiel scienca principo, la venontajn lundojn sekvis prelegoj pri aktualaj problemoj de junularo kaj pri modernaj aspektoj de l'etiko. Depost majo kunvenas la klubo regule ĉiun lundon je la 19.30 horo en la *Filozofia fakultato* Praha I, Smetanovo nám., en la dua etaĝo, ejo 182.

Nia atentigas ĉiujn universitatanojn pri la agado de l' Akademia Esperanto-Klubo kaj invitas ilin, ke ili venu en nian amikan rondon. Informojn donos al ĉiuj interesiĝantoj s-ano Jaroslav Hanuš, Praha XII, Kolínská 9.

*Blinduloj.* Kunvenoj por reorganizi la movadon en CSR okazis la 16. II., 16. III. kaj 11. IV. Krom el laboro la programo konsistis el muziko, parolado kaj poezio. Ĝis nun aliĝis 27 kunlaborantoj el Praha kaj el la provinco, ankaŭ el Slovakujo. La preparan komitatan prezidas s-ino Josefa Blažková, lingvo-instruistino. La unua n-ro de la brajle presita organo »Aŭroro«, dua periodo, aperis en aprilo; redaktas s-o Vuk Echter. Instruado al blinduloj okazas en la Deyl-Instituto; gvidas s-ino Blažková. Pluaj kursoj komencis la 29an kaj 30an de aprilo. — Adreso: Societo de Ĉeĥoslovakaj Nevidantaj Esperantistoj, oficiala organo Aŭroro, Soudní ul. 739, Praha XIV.

*Filo de Julio Kövory,* fervora esperantisto el Bratislava, kiu fuĝis el la »sendependa« Slovakujo Amerikon, vizitis en aprilo E. Klubon en Praha. Li vivas en New York, nun li laboras en Berlino ĉe Usona milita komando. En Praha li haltis vojaĝante el Budapeŝto Berlinon. Sur siaj lernejoj atestoj el germana gimnazio en Bratislava li havas enskribitan kiel gepatran lingvon Esperanto. Tiel sukcesis enskribi ĉe la gimnazia direkto en jaroj 1922—1928 lia patro, esperantisto fervorega kaj judo la plej idealisma, kiun mi iam konis. La gepatroj kaj la ambaŭ filoj estu salutataj de ilia amiko sincera Kamarýt!

*Esperanto en Slovakaj komercaj lernejoj.* Pro ĝia graveco ni publikigas la koncernen dekretan, kiun ni enpresis sur paĝo 19 en esperantlingva traduko, en originala teksto:

Poverníctvo školstva a osvety v Bratislave. — Ĉís.: 121.233/46-IV/I. — Vec: Obchodné učilištia, zavedenie esperanta. — V Bratislave dňa 4. marca 1946. — Riaditeľstvám obchodných učilišť. — Povol'ujem, aby na obchodných učilištiach, na ktorých sa nájde súca sila vyučovacia a zistí sa u žiactva záujem, bolo zavedené vyučovanie medzinárodnej reči esperanto ako nepovinného predmetu. Na OA sa môže vytvoriť jazykový krúžok zo žiakov II. a III. ročníka; na OŠ z II. roč. Krúžky možu mať maximálne 25, minimálne 10 žiakov. Vyučovanie môže trvať najviac jeden školský rok v týždenných dvoch hodinách; môže byť rozdelené na 2 polroky za sebou aj mimo toho istého školského roku.

V školskom roku 1945/46 vyučovanie sa može začať aj od 1. aprila 1946. — Za poverenika: Lichner, v. r.

*Polica esperanta rondeto en Praha* komencis denove sian agadon de la 6. XI. 1945. Kunvenoj okazas ĉiumerkrede je la 18 horo en Praha II, Mikulandská 10. Korespondajoj estu sendataj al s-o Václav Zámostný en Praha XI, 699, Palackého tř. 26.

## MORTIS.

*L. Flajšr.* Laŭ sciigo de Radio-Praha en komenco de majo estis trovita en koncertejo Mathausen sub tabla tabulo surskribo adiaŭa de ekzekutoto: *Leopold Flajšr* † 17. 5. 1944. L. Flajšr estis bona esperantisto, kiu vizitadis dum la milito kunvenetojn de E. K. en Praha. Li estis laboristo en uzino Eta kaj organizis tie dum la milito sekretan Esperanto-kurson. Li aktive partoprenis eksterleĝan rezistan movadon.

*P. Jan Nep. Mašek,* ĉefepiskopa notario, paroĥestro, konsistoria konsilanto, fidela partoprenanto en nia movado, mortis 13-an de majo 1945. Li naskiĝis 31. V. 1863 en Soběkury. Paroĥestro en Stupno li estis depost 1909, do pli ol 35 jarojn. Li estis egale sincera filo de sia nacio kaj same fervora partiano de esperantismo, propagandante nian lingvon precipe inter kredanta katolika publiko. Sur presita informfolio pri lia morto estas en la ĉeĥa teksto esperantista stelo kun kruco kaj esperantlingva konstato: Fervora pioniro de l' Esperanto. La konstato estas trafa. Li estis pioniro nelacigebla.

*Laŭ rimarko sur la resendita unua kajero estas mortaj:*

Karel Krolmus, faka instruisto, Kralupy n. Vlt., aŭtoro de lernolibro.

Jan Vojtíšek, Lázně Bělohrad.

Zdeněk Skácel, Rájec nad Svitavou.

V. Uhlíř, Brno-Královo Pole.

Šilhánková, Plzeň.

Jana Poláková, Mladá Boleslav.

Josef Křemenák, Záboří p. Proseč u Skutče.

Frant. Kasalý, profesoro, Telč.

A. Žáková, instruistino, Střelice u Brna.

Jakub Konop, direktoro, Praha-Smíchov.

Augustin Grigar, Kolín.

## Radio.

*Praha.* Niaj radio-programoj daŭras kaj trovas ĉiam pli vastan aŭskultantaron. Korespondajoj pravas, ke ni estas aŭskultataj jam en 19 landoj: Krom la 11 nomitaj en nia unua n-ro, venis leteroj el: Hispanio, Portugalio, Hungario, Austrio, Irlando, Jugoslavio; eĉ el Germanio skribis al ni soldato deĵoranta en la angla armeo, ke la tieaj esperantistoj (plejparte revenintaj el koncertejo) aŭskultas nin (en Hamburgo, Godesberg kaj Frankfurt a./M.)

El pluraj lokoj venis informoj pri amasa aŭskultado ekz.: *Skövde* (Svedio) 11 subskriboj, pli poste 65 aŭskultantoj, *Breda* (Nederlando) 12 subskriboj, *Kirkcaldy* (Skotlando) 21 subskriboj, *Helsinki* (Finlando) 13 aŭskultantoj, *Nyons* (Francio) 16 subskriboj, kaj aliaj.

La temoj de radiosendoj en la nuna jaro estis:

1. Slanina, Eliášová, Valeš: Novjara sceno
1. Paleček: La ĉeĥa metio
10. Budíková (Nacia opero): Kantoj de Kříčka en traduko de dro T. Pumpř

14. 1. Bouška: Esperantistoj en servo de la vero
17. 1. Hromada: Esperanto-Radiorevuo de Praha I.
21. 1. Šimon (Mařík): Rilato de Bohemio al la mezepoka Regno
24. 1. Holcová-Slanina: Intervjuo pri glitkura sporto
28. 1. Malík: Pri la ĉeĥoslovaka kongreso kaj venonta laboro
31. 1. Kaukušová: Pri la Verda stacio
4. 2. Malík: Kvar ĉefaj arteminentuloj
7. 2. Hromada: Esperanto-Radiorevuo de Praha II.
11. 2. Paleček: La ĉs. metio apud la ŝtatigita industrio
14. 2. Malík: Politika karnavalo
18. 2. Bartošíková-Woudstra: La dumilitaj spertoj eh Anglio
21. 2. Valeš: La ĉeĥa vitro-industrio
25. 2. Hromada: Pri la ĉeĥa poeto Svatopluk Čech
28. 2. Malík: Pri malamikaj tendencoj en la eksterlando
4. 3. Slanina (kaj aliaj): Karnavala sceno
7. 3. Hromada: T. G. Masaryk. Esperanto-Radiorevuo III. (50-a elsendo)
11. 3. Malík: Resumo de la ĝisnuna laboro en Radio-Praha
14. 3. Echnner: Ne sole germanaj infanoj malsatas
18. 3. Jurák-Slanina: Intervjuo pri la slovaka militrezisto
21. 3. Hrnčířová (Nacia Opero): Arioj el operoj »La vendita fianĉino« kaj la »Najado«. Trad. Dr. Pumpr
25. 3. Hromada: Pri kelkaj novaj libroj esperantaj
28. 3. Šupichová: Jan Amos Komenský - Comenius
1. 4. Slanina-Valeš: Gaja sceno aprila
4. 4. Hromada: Radio-Revuo IV.
8. 4. Ing Krajíc: Tábor - nia programo
11. 4. Malík: Proceso kontraŭ K. H. Frank
15. 4. Hromada: Ĉu kunagi a perej (Privat). - Informoj
18. 4. Mařík - Sládková: Paska programo
22. 4. Malík: Paska paco de la Ĉs. ruĝa kruco
25. 4. Paleček: Eksportataj produktoj de ĉs. metio
29. 4. Hromada: Muzika vivo en Praha

(Korekto: La 22. 10. 45. Szilágyi: Impresoj pri la renaskiĝanta demokratio.)

*Mallong-ondaj disaŭdigoj* (nun 25,34 m) okazas jam je la 21,00—21,30 horo ĉiutage.

*Moravská Ostrava* (Bráf-strato 5) elsendas nun Esperanto-programon regule ĉiumarde je la 22,50 horo laŭ mezeŭropa tempo, ondlongo 325,4 metroj, 922 kilocikloj. Ĝi vokas ĉiun, kiu volas. Skribu de tempo al tempo, ĉu vi aŭskultis nian programon, ĉu ĝi estas bone aŭ-

debla, kie vi aŭskultas, kiaspecan aparaton vi havas kaj ĉu niaj programoj plaĉas al vi. Se vi deziras, ke io ŝanĝiĝu, skribu al ni tion, ni volas al vi servi! Por ĉiu alveninta letero ni aparte dankos pere de radio. Plej interesajn sciigojn ni komunikos al la mondo!

*La temoj dissendataj el Moravská Ostrava estis:*

18. 9. Zd. Raška: Proĉ esperanto? (ĉeĥe).
25. 9. Milan Rusínský: Pri poeto Petr Bezruč.
2. 10. Dr. Miloš Wolf: Pri vintroindustrio en Moravia Valaĥio.
9. 10. Emil Gebauer: Tankistoj antaŭ urbo Moravská Ostrava.
16. 10. Milan Rusínský: Pri urbo Mor. Ostrava.
23. 10. Alois Červenka: Kejkaj notoj el historio de Těšín-lando.
30. 10. Ing. Frant. Fára: Rivero Odra en kadro de navigacio Ĉeĥoslovaka.
6. 11. Ing. Frant. Fára: Těšín-lando. (politika prel.)
13. 11. Ant. Satek: Pri antikva urbo Štramberk en ĈSR.
20. 11. Ant. Satek: Pri sileziaj arbaroj (polit. prel.)
27. 11. Zd. Raška: Resumo de agado de ĉeĥosl. Esp. kluboj.
4. 12. Dr. Václav Renč: Pri kuracado per penicilin.
11. 12. Otto Sobotka: Kio estas nova en ĈSR?
18. 12. Adolf Staňura: Dr. L. L. Zamenhof.
8. 1. Dr. J. Šmolka: Nova Ĉeĥoslovakujo (Ia parto).
15. 1. Dr. J. Šmolka: Nova Ĉeĥoslovakujo (IIa parto).
22. 1. Ing. Dr. Romuald Drlík: Pordego en mondon M. Ostrava.
29. 1. Otto Sobotka: Kio estas nova en ĈSR?
5. 2. Jaroslav Richtar: Pri silezia eksporto.
12. 2. Ing. Josef Hlisenkovský: Mekanikigo en ekspluato de karbo.
26. 2. Otto Sobotka: Kio estas nova en ĈSR?
5. 3. Otto Sobotka: Kio estas nova en ĈSR?
12. 3. Vilém Nový: Tutslava ideo kaj ĝia evoluo.
19. 3. Václav Veselý: Sindikata movado iame kaj nuntempe.
26. 3. Ing. Jos. Teindl: Scienco en popola demokratio.
2. 4. Otto Sobotka: Kio estas nova en ĈSR?
9. 4. Dr. Vlad. Bartovský: La vojoj de nazista justeco.
16. 4. Jan Zborovský: Kion vidigas librovendistaj montrofenestroj.
23. 4. Oto Sobotka: Superrigardo de okazintaj kaj laboro en ĈSR.
30. 4. Milan Rusínský: Denove liberaj!

(Ĉiuj prelegoj, escepte tiun de Staňura, estis tradukitaj kaj legitaj de Vlad. Slaný aŭ Zd. Raška).

## Lokaj informoj.

**Brno.** La Klubo klopodas, ke ankaŭ Radiostacio-Brno enmetu Esperanto-programojn laŭ sia glora tradicio. Ĝi ricevis jam promesojn, sed la efektiviĝo estas prokrastata, ĝis kiam la stacio, detruita de germanoj, ricevos pli fortan disaŭdigan ekipon.

**Doksy.** Publika prelego de Adolf Malík 24-an de februaro. — La unua kurso gvidata de V. Špŭr finis la

18-an de majo per kursfina festo kaj Esperanto-ekspozicio. Dua kurso por 52 studentoj de burĝa lernejo gvidata ankaŭ de V. Špŭr komencis la 7-an de majo. — Preparaj laboroj por Csehmetoda kursaro 21—31-an de julio daŭras. Jam anoncis sin pluraj interesantoj.

**Hradec Králové.** E. Klubo aperigis poŝtkartojn kun tre bela bildeto el la urbo invitanta al la klubaj kunvenoj ĉiumerkrede en la Národní kavárna.

**Karlovy Vary.** Kurso de la ÚRO-Laborlernejo finiĝis post 30 lecionohoroj. Aliĝis 14, meza partopreno 9, finis 6 personoj. Instruis F. Mílek. — Estas preparata fondo le la loka grupo.

**Lanškroun.** En la burĝa lernejo estas Esperanto-studrondeto gvidata de fakinstruisto J. Mlynář.

**Litoměřice.** Esperanto-rubrikon en la semajna gazeto Nová doba gvidas Dr. Josef Černý. En la numero el 15.

II. 1946 estis enkonduka artikolo kaj komenco de la kurso.

**Plzeň.** Okcidentbohemiaj esperantistoj okazigis la 6-an de aprilo esperantlingvan prelegon de Vuk Echter el Praha pri *Esperanto en servo de nova homeco* en Měšťanská beseda. La pensoplena prelego de eminenta pensulo havis profundan resonon. — Kurso de la ÚRO-Labor-lernejo finis post 15 duhoraj lecionoj la 5-an de aprilo per publika kursfina ekzameno.

**Slezská Ostrava.** Esperantista rondeto okazigis sian ĝeneralan kunvenon la 31-an de marto 1946 en klubejo de la Lidový dům na Kamenci. Ĝi estis aparte solena por rememorigi 25 jarojn de ekzistado de la Rondeto. Festan prelegon el historio de la Rondeto havis s-o A. Kubala. La invitilo al la kunveno akcentas bezonon, ke neniu samideano staru aparte kaj aliĝu al komuna laboro.

Interesantoj el la ĉirkaŭaĵo turnu sin al J. F. Mazánek, Dusíkárný, M. Ostrava.

**Tábor.** Loka grupo aranĝis 30. IV. 1946 fonda kunvenon, kiun partoprenis 22 gesamideanoj en hotelo »Znamenáček«. Estis elektita nova estraro: Prof. Inĝ. Ladislav Krajíc, inspektoro de metiistaj lernejoj, prezidanto, prof. Dr. Hugo Jokl, profesoro de gimnazio, vicprezidanto, Jožka Škorpil, komercisto, sekretario. Loka grupo kunvenas ĉiusemajne marde je la 19a en hotelo »Znamenáček«. — La 2an de majo estis finita kurso de esperanto por komentantoj, kiun aranĝis Laboro-lernejo en Tábor, kiun partoprenis 20 personoj. La kurson gvidis prof. Inĝ. L. Krajíc, ŝtate ekzamenita instruisto de Esperanto. Kurson por komentantojn sekvas nova kurso por progresintoj, kiun aranĝos la loka grupo de EA kaj gvidos Inĝ. L. Krajíc.

Prezidanto de la grupo Inĝ. Krajíc havis la 8an de aprilo en radio Praha esperantlingvan prelegon pri la temo: Tábor estas nia programo. — En lokaj semajnaj gazetoj Táboorské slovo, Jiskra, Palcát estas ofte reprezentaj artikoloj pri Esperanto, pri la esperantista movado kaj loka grupo. Ankaŭ en lokaj paĝoj de gazetoj »Svobodné slovo«, »Práce« kaj »Lidová demokracie« estas aperigataj sciigoj pri agado de la grupo kaj pri Esperanto. Adreso estas: Esperanto-Asocio en ĈSR, loka grupo Tábor, Jeronýmova 1984.

**Valašské Meziříčí.** S-o Vil. Šob instruas rondeton de interesuloj laŭ la Kilián-lerolibro. Ankaŭ en la najbara loko Poličná li vivigas intereson pri E. Kurso aŭtuna estas preparata.

**Vejprty.** Kurson gvidas s-o Jan Skalický. Fondo le loka grupo estas preparata.

## Korespondi kun ĉs samideanoj deziras

F-ino Lora Taševa, 40 str. Ribarica, RUSE, Bulgario.

E. M. Scheffel, 1 Res-Boeremstraat 9, E. ROTTERDAM. Nederlando.

J. Duncker, Beukenweg 21, 2, AMSTERDAM O. Nederlando.

Maiken Jørgensen, Jomfrustien 7, BERGEN, Norveĝujo.

St. D. Apostolov, Konstrua sekcio, Minejo PERNIK, Bulgario.

Trifon Borisov Trifonov, Petokladenci, SVIŠTOVSKO, Bulgario.

Ivan Gančev, PIRDOP, Bulgario.

Georgi Hristov Nepov, v. Podoil, SAMOKOVSKO, Bulgario.

Dimitr Dobrev, str. Dr. Balsamažiev 2, PAZARDŽIK, Bulgario.

Dimitrij Rojnov, ul. Alexandar Ekzarh 103, STARAGORA, Bulgario.

Genčo Kocev, str. Prastjo 23, PEŠTERA, Bulgario.

Kiril T. Kirév, v. Opalčeneč, ĈIRPANSKO, Bulgario.

Boni Iliev Pandarski, Paževo-Konare, PLOVDIVSKO, Bulgario.

Georgi Savov, poŝtestro, PEŠTERA, Bulgario.

Ivo Borovečki, studento, ZAGREB, Kamenjak 4, Jugoslavio (prefere kun studentoj).

S-ino A. Coppé, Paulus Beystraat 59, Deurne-C-ANTWERPEN, Belgio.

Wladyslaw Misiewicz, Żeromskiego 27, RADOM, Polujo.

Jan Wojtas, Pilsudskiego 1, RADOM, Polujo.

Wladyslaw Kijak, Poŝtoficejo, RADOM, Polujo.

Józef Dulias, Bank Komunalny Pilsudskiego, RADOM, Polujo.

Wladyslaw Frey, Żeromskiego 9, RADOM, Polujo.

O. T. P. 4 rue J. C. Tissot, ST. ETIENNE, Francio.

F-ino Anna Ger. Barzuka, PALUKIA-SALAMINOS apud Athinai, Grekujo.

Konst. Ionnidis, Odos Paras Kevepoulou 28, TESALONIKI, Grekujo.

S-ino Vasso Tazzis, Odos Hippokratous 12, ATHINAI, Grekujo.

Ivan K. Vasilev, Ul. Batak 26, PAZARDŽIK, Bulgario.

Nikifor Malinov Denkov, ul. Veslec 82, SOFIA, Bulgario. (Kun muzikistoj.)

Jeanne Dedieu, 23, rue Viktor Hugo, PRADES, Pyr. Orientales. Francio. Piere Lataste, 31, rue Francis Planté, PESSAC, Gironde. Francio.

R. Ricordeau, La Terriere Bochart, par Saint Denis, ORNE. Francio. (La lastaj tri kun skoltoj-instruistoj.)

Prof. IVAN H. KRESTANOFF, PIRDOP (Sofia), BULGARIO, deziras ricevi ĉiujn ajn esp. librojn

kaj gazetojn, ĉar lia riĉa biblioteko bruliĝis dum bombardado de Sofia. Lia biblioteko estis por li granda nestarigebla trezoro, pli ol 3000 ekzempleroj kaj 713 gazetkolektoj. Interŝanĝe li sendos siajn E-verkojn.

**Prelegvojaĝo de J. Vitek tra Svedujo.** En marta numero de Svenska Esperanto-Tidningen estas lia bildo kaj ĉefartikolo »Alvenis la unua eksterlanda prelegisto«, en la aprila numero estas informo, ke Vitek prelegas nun en meza Svedujo. Li komencis la prelegserion en la plej suda urbo Ystad kaj li finos plej norde fine de la majo en Kiruna. »La gazetoj ĉie rakontas pri lia intereso por Esperanto kaj pri la forta Esperantomovado en Ĉeĥoslovakujo. Ĝis nun la prelegvojaĝo estis nur sukcesa kaj SEF esperas, ke oni daŭre montru intereson al la unua oficiala esperanto-parolanta prelegisto, kiun la ĉeĥoslovaka respubliko sendis eksterlanden.«

**Leteron pri Radio Praha** de Rud. Hromada enpresas Dansk-Esperanto-Blad el januaro 1946.

**Literatura mondo vivas.** Literatura-Mondo-Eldonejo informas ĉiujn siajn amikojn kaj kunlaborantojn, ke la eldonejo rekomencis la funkciadon. Ĝoje ni informas, ke la red-

aktoraro s-anoj Kalocsay, Baghy, Totsche kaj aliaj fartas bone. Multe ni ĝojos tion samon aŭdi de ĉiuj niaj reprezentantoj, abonantoj kaj amikoj. Provizora adreso: Béla Bleier, Pest-szentlőrincz, Hargitta-str. 10. Alser-ĉu nin tuj, se la poŝta rilato tion ebligas! (Svenska Esperanto-Tidningen, dec. 1945.)

*Per unu voĉo*, organo de la Laborista Esperanto-Kunularo aperas en Johannesburg (Poŝtkesto 7356) en Sudafrika Unio. Redaktas ĝin. W. F. Rolt, (Ciklostilita). Enhavas interesajn artikolojn pri okazintaĵoj en Sudafrika Unio.

*Provoj diskonigi Esperanton inter la studentaro de Ĉeĥoslovakujo.* Detala artikolo akcentata poveblojn en volo krei Internacian studentan federacion sidantan en Praha verkita de s-o Jar. Mařík aperis en apr. numero de Esperanto Internacia. La sama numero enhavas bildon de s-o A. Slanina kaj Yvonne de Petri okaze de l' intervjuo en Radio-Praha la 5-an de novembro 1945.

*Bildo de s-o K. Šolc* estas enpresa en Flandra esperantisto (feb. 1946). S-o Šolc laboris plurajn jarojn inter flandroj kiel Csehmetoda instruisto. Ilia organo alte taksas efikon de lia laborado.

*Kursfinaj ekzamenoj* fariĝis kutimo ĉe pluraj kursgvidantoj post la milito. Ili sekvas ekzemplon de kelkaj Csehmetodaj instruistoj. Ĝi estas kutimo bela kaj respektinda. La kursanoj ĝojas, kiam ili ricevas skribitan konfirmon pri sia lernado en la kurso. Taŭgaj presitaj formuloj ĉeĥ-kaj esperantlingvaj por tiu konfirmo estis eldonitaj de la Asocio kaj estas riceveblaj de la Libro-Servo po 2 Kĉs.

#### EKZAMENA KOMISIONO DE EAĈSR

kunsidos la 27-an de septembro en Praha. Ĝi ekzamenos ĉu pri scio de Esperanto, ĉu pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj. En la venonta n-ro estos represita ekzamena regularo, Legu ĝin en Ligilo 1938!

#### LIBRO-SERVO

*klopodas servi al Vi kaj ĝi efektive servas.*

Tamen ofte Vi devas atendi. Tio ne signifas, ke ni ne zorgas pri viaj mendoj. La prezidanto de l' Esperantista Klubo en Praha kaj ĉefdelegito de IEL, kiu ĝis nun prizorgas nian libroservon, faras ĉion, kio estas en lia forto kaj povo. Tamen ofte okazis, ke samideanoj devis pli longan tempon atendi plenumon de siaj mendoj. Ni zorgas, ke tiu nia servo havu pli multajn kunlaborantojn, aŭ ke la gvidadon transprenu iu, kiu sin povos ankoraŭ pli dediĉi al la afero. La mendojn por la Libro-Servo sendu nun senpere al ĝia estro

**JAR. ŠUSTR**  
en Praha I, Benediktská 11.

#### ESPERANTO-FLAGETOJ

*teksitaj*

42×33 mm, po Kĉs 3.50  
riceveblaj de la Libro-Servo  
J. ŠUSTR, PRAHA I,  
Benediktská 11.

Ekspozicio-materialon  
bezonas por taŭga uzo

*Jaap Labordus  
van Egmontkade 49  
en ZUILEN (Nederlando).*

#### TEKNIKAJ TERMINAROJ.

Interesiĝantoj pri faka terminologio anoncu sin por kunlaborado ĉe Sven Alexanderson, civila inĝeniero, Jakobsbergsgat 20 B., Västerås, Svedujo.

#### JURNALISTOJ-ESPERANTISTOJ

anoncu Vin por preparaj laboroj pri fondo de Internacia ĵurnalista societo. La korespondataĵojn sendu al Einar Adamson, redaktoro, Värmlands-gatan 18. Göteborg, Svedujo.

*Negra samideano Nathaniel Kola*

*Ajaji*, el Brita Nigerio, batalis en la terura milito kiel soldato de la USA-ARMY kontraŭ Germanujo. Li skribis en letero al s-ro K. Sedláček en Třebíč: »Transdonu en via patrujo sinceran saluton al viaj Ĉeĥoslovakaj samideanoj kaj mi gratulas ilin multe de sukceso en ilia laboro en nova, ree libera Respubliko.« Ni ripetas lian saluton.

#### LIBRO-SERVO

servas al vi  
liverante librojn  
kaj alian  
Esperanto-materialon.  
Mendojn sendu al  
ĝia estro

*Jar. Šustr en Praha I,  
Benediktská 11.*

Aperis nova eldono de  
**KILIAN - LERNOLIBRO**

Th. Kilián:  
Esperanto. Uĉebnice a čítanka.  
Kĉs 39.—. Aŭfrankite Kĉs 42.20.  
Unua postmilita eldonajo!  
Mendu ĉe nia Libro-servo.

#### IN MEMORIAM.

Dne 3. května 1946 je tomu rok, co zahynul tragickou smrtí při potopení lodi Thielbeck v Lübecké zátocce, po šestiletém žalářování v konc. táborech, náš drahý manžel a otec

**ALOIS BARTA,**  
štábní rotm., tel. prap. 2.

Prosíme všechny přátele o tichou vzpomínku.

*Marie Bártová, manželka,  
jménem rodiny.*

Kroměříž, Belanská 1.

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel, a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze 47. Redaktor Dr. Stan. Kamarýt. Tiskem Jar. Strojila v Přerově. Účast na poštovní novinové službě povolena ředitelstvím pošt v Brně čís. jedn.

IA-4-2370-0/37132 - 15. 3. 46. Dohládací poštov. úřad Přerov 2.